

## Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2026

Jarkolekto 13 - Numero 4



# ENHAVOTABELO

de oktobro 2026

|                                                        |    |
|--------------------------------------------------------|----|
| Titolpaĝo: .....                                       | 1  |
| Enhavotabelo .....                                     | 2  |
| De ni por ... ni! .....                                | 3  |
| Moneroj & medaloj .....                                | 4  |
| <i>90a jariĝo de Vlastimil Křčvara</i>                 |    |
| <i>Flor-Ludoj I Bieflor</i>                            |    |
| <i>Odo Bujwid (1857-1942)</i>                          |    |
| <i>Jubilea medalo 1887-1987 Piso - Varsovio</i>        |    |
| Spikumaĵoj & suplementoj: Numismatiko en Kabindo ..... | 12 |
| Por spuremuloj! .....                                  | 14 |
| Aspektoj de numismatiko: Nordia Oro ... ..             | 15 |
| Valormarkoj & valorbiletoj: .....                      | 18 |
| Medalistoj: František David (1913-2002) .....          | 21 |
| Historiaj aspektoj: Ŝtono de YAP .....                 | 22 |
| Terminaro: Alfabeta listo (47) .....                   | 24 |
| Numismatika Forumo: La futuro de mono .....            | 25 |
| El la gazetaro: .....                                  | 26 |
| Retpoŝto .....                                         | 27 |
| Anoncoj & eventoj .....                                | 35 |


**Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)**

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts  
Provlegado: Jozefo Horvath  
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!  
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: [bert.boon@skynet.be](mailto:bert.boon@skynet.be)  
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>  
[www.esperanto.es/biblioteko](http://www.esperanto.es/biblioteko)  
[www.kolektado.esperanto.cc](http://www.kolektado.esperanto.cc)

## DE NI POR ... NI!

### “Medalionoj”



Antaŭ ne tre longe mi denove vizitis la novan Internacian Esperanto-Arkivon (IEspA) en la urbo Diest (Belgio). *Kontaktu: “[www.iespa.eu](http://www.iespa.eu), [info@iespa.eu](mailto:info@iespa.eu)”*

Evidente mi unuavice kaŝiris al la bretaro kun brokantaĵaj libroj kaj subite mi trovis libreton de iu Zofia Nalkowska “Medalionoj” (1946). La numismato en mi tuj vekigis kaj sen intereso por detaloj, mi rezervis ĝin por legi ĝin hejme.

Nur poste mi malkovris ke ĝi temas ne pri “*Juvelo en formo de plata malfermebla skatoletto, kiun oni ordinare portas per ĉeno ĉe la kolo (...)*”, sed pri “*Rondforma aŭ ovala bareliefo kun figuraĵo*” (PIV).

Pardonu al mi, ke mi sekve ne jam senŝualigas la ĉefan temon de la poŝlibreto (110 paĝetojn maldika), verkita de la pola verkistino Zofia Nalkowska kaj eldonita en Varsovio en 1957. Elpoligis ĝin Tadeusz Hodakowski. Tradukis la tre interesan enkondukon Isaj Dratwer (originala verkinto: Henryk Bereza). La libreto enhavas ok kurtajn rakontojn en literatura stilo kaj kun dokumenta karaktero. Ĉiu rakonto simbole estas ovala, rompita bareliefo kun foto de mortinto sur tomboŝtono.

Mi devas konfesi, ke mi jam legis dekojn da libroj pri la kruelaj krimoj de la hitleranoj en Pollando kaj aliloke, pri la holokaŭsto, pri brutovagonaroj al la koncentrejoj, pri la konstanta nigra fumo el la fornoj ktp. Tamen, neniam mi jam legis tian sinregan prozon en dokumenteca libro, literatura notaĵo, unika kaj komparebla kun nenio, eĉ ne en la pola literaturo. La aŭtoro volas kompreni la inkubon de la milito, penas montri la moralan falon de la homo, serĉas signojn de heroeco en la kontraŭbatalanta homo, kontraŭmetanta sian propran homecon al la malhumaneco de la tempo, de ĉiuj tempo kaj epoko.

Ke hodiaŭaj homoj apenaŭ lernis ion el la historio, montras aktualaj konfliktoj, militoj kaj genocidoj tutmondaj! Kiu rifuzas serioze studi la historion, fakte devos ripeti ĝin, ĉu ne?

Bert

## Vlastimil Kočvara

Vlastimil, fidela ENA-membro kaj -aktivulo, naskiĝis la 12an de aprilo 1936 en Bartovice; li estas ĉeĥa esperantisto, eksprezidanto kaj de ĈEA kaj nuntempe la prezidanto de Matice slezská, silezia kulturprotektita fondaĵo en Opava. Krome, frato de la esperantisto Drahomír Kočvara.



Post studado en realgimnazio en Ostrava (1947-1948) kaj en mezlernejo en Silezia Ostrava (1948-1951) li fariĝis metilernanto en Hlučín (1951-1952), faka tornisto de metaloj, poste li daŭrigis en maŝina mezlernejo en Opava ĝis abiturienta ekzameno (1956), kiu malfermis al li vojon al minista altlernejo en Ostrava, kie li en 1961 akiris titolon de inĝeniero. Li laboris en konstruktejo de Ostroj Opava (1960-1967), per telestudado li atingis pedagogian klercon ĉe la universitato en Olomouc (1969-1971), instruis en maŝina mezlernejo en Opava (1967-1972) kaj en konstrufaka metilernejo en Opava (1973-1974), revenis al Ostroj Opava kiel eksperimenta teknikisto (1975-1990) kaj kiel ĉefo de kleriga fako (1991-1996) ĝis emeritiĝo en 1996. Dufoje edziĝinta, li havas tri filinojn kaj unu filon. Nuntempe li loĝas en Opava.

Apud Esperanto lin interesas ankaŭ filatelo kaj **numismatiko**, sporto kaj turismo (aktiva membreco en sportaj kaj turismaj organizoj), literaturo kaj kulturhistorio ĝenerale. Li membras en kluboj de legantoj, poezi-amantoj, pentristoj kaj skulptistoj, en klubo de amantoj de la antikva Prago, en la societo Karel Hynek Mácha kaj en la kulturhistoria societo de Silezia Landa Muzeo. Multjare pinta funkciulo de la silezia kulturinstituto “Matice slezská”. Li kolektas ĉiujn eldonojn de la klasika romantika poemo “Majo” de K. H. Mácha kaj prizorgis ankaŭ eldonon de la esperantlingva traduko far Tomáš Pumpr en 1997. Kiel esperantisto li preparadis kulturfestivalojn en Opava, kunlaboris kun la muzeo de la poeto Petr Bezruč en Opava, dum multaj jaroj zorgis pri eldona fako de ĈEA, nun li vizitas la urban muzeon en Česká Třebová, kie li helpas ordigi materialojn de la Esperanto-fako en la muzeo.

Esperanton al li trudis la pli aĝa frato en 1948 kaj li ekamis la lingvon. En 1949 li faris kurson ĉe Vladimír Slaný kaj aliĝis al la klubo Junularo Ostrava (1950-1952). Poste li membriĝis en Esperanto-rondeto ĉe Kulturdomo Petr Bezruč en Opava (1952-1956) kaj Esperanto-klubo en Ostrava (1956-1960), eĉ laboris en la kluba komitato. En 1960 li fondis novan Esperanto-rondeton en Ostroj Opava, al kiu transiris la membroj de la kulturdomo Petr Bezruč. Vlastimil Kočvara fariĝis prezidanto kaj prezidas senĉese.

En 1969, kiam estis refondita organizo de ĉeĥaj esperantistoj kiel Ĉeĥa Esperanto-Asocio, li fariĝis membro de ĝia Centra Komitato. En 1979 estrarano de ĈEA (vicprezidanto), en 1993 prezidanto (ĝis 1999). De 1988 komitatano de UEA.

Organizanto de multaj renkontiĝoj, dum kiuj li respondecis pri kulturaj programoj (Pardubice, Vsetín, naciaj kongresoj kaj konferencoj), ĉeforganizanto de renkontiĝoj en Opava, li publikigis multajn materialojn pri Esperanto en la ĉeĥa –inkluzive de kvar ekspozicioj en Silezia Landa Muzeo, literaturaj vesperoj, publikigis en Esperanto diversajn materialojn.

Li kunorganizis somerajn tendarojn en Žimrovice (ekde 1953), Červená, Lančov, en kiuj li plenumis diversajn funkciojn (instruanto, tendarestro, programestro).

Dum lia prezidanteco de ĈEA li estis honorita aranĝi la 81an UK en Praha, kiu akceptis la faman Pragan Manifeston.

*Fonto: Vikipedio > legu tie pli pri liaj multaj publikaĵoj!*

## MONEROJ & MEDALOJ

### Tipo C1 – Esperanto-medaloj

90a jariĝo de Vlastimil Kočvara



Lando: Ĉeĥio  
Metaloj: latuno/arĝento  
Diametro: 48 mm  
Jaro: 2026



Kvanto: 50 (latuno) / 10 (arĝento)  
Pezo: arĝento 57 g / latuno 40 g  
Konceptinto: Viktor Wolf (per AI)  
Diko: 3 mm

#### *Averso:*


supre: surskribo “VLASTIMIL KOČVARA”

meze, maldekstre: disko kun “90”, du diversaj branĉetoj, malfermita simbola libro kaj teatra masko  
sube: 1936 - 2026

#### *Reverso:*

supre, ĉirkaŭe: ĉeĥa surskribo “K 90. NAROZENINÁM VYDALA ČNS V OPAVĚ” (= Eldonita de la Ĉeĥa Numismatika Societo en Opava okaze de la 90a naskiĝtago)

meze: malfermita libro kun biografieca teksto ĉeĥa:



**Laŭ profesio maŝiningeniero,  
Sileziano en la koro,  
numismato laŭ spirito,  
esperantisto laŭ lingvo,  
kaj amanto de la teatro**

*La redakcio de ENA gratulas kaj dankas Vlastimil pro la sendo de la nemalhaveblaj informoj!*

## “Internaciaj Floraj Ludoj” : Esperanto-beletra konkurso

La nomo “Floraj Ludoj” devenas de la okcitanaj kaj katalunaj Floraj Ludoj, mezepoka beletra konkurso, reprenita en la 19a jarcento, okaze de la literatura renaskiĝo de tiuj regionaj lingvoj en Hispanio. (*Tamen jam en la antikva epoko la diino Flora estis per ludoj honorata!*)



Iniciatis ilin Frederic Pujulà i Vallès en 1908 kadre de la redakcio de “La Revuo”, lige kun la baldaŭa Universala Kongreso en Barcelona, kie la unua ĉeflaŭreat(in)o estos la famega germana esperantista poetino Marie Hankel.



La "Kvaro por la Kvara" (de maldekstre Eduard Mybs, Albert Schramm, **Marie Hankel** kaj Heinrich Arnhold) kun la gesinjoroj Zamenhof, dum la UK 1908 en Barcelono

## Tipo C6 – Ordenaspektaj medaloj

### Flor - Ludoj I Bieflor



Lando: Brazilo

Metalo: kupronikelo

Diametro: 50 mm

Jaro: *serĉata*

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 20,8 g (inkluzive ringeto)

Medalisto: *serĉata*

Diko: 1 mm

**Averso:** (*unuflanka medalo*)

supre-meze: “FLOR - LUDOJ ★ JOGOS FLORAIS”

“KULTURA KOOP DE ESPERANTISTOJ”

meze: “I BIEFLOR”

sube-maldekstre: malhelverda steleto kun centre litero E

sube-dekstre: ruĝ-verda rozo

**Rimarko 1:**

la rozo estas ruĝa kaj verda; la surskriboj nur verdaj

**Rimarko 2:**

la medalo havas supre okuleton kun arĝenteca ringeto por ĉeno aŭ rubando

**Rimarko 3:**

JOGOS FLORAIS = portugala por “FLOR-LUDOJ”

**Rimarko 4:**

BIEFLOR = Brazilia Internacia Ekspozicio de FLORoj

**Rimarko 5:**

KKE: Kultura Kooperativo de Esperantistoj

*La redakcio tutkore dankas ambaŭ niajn membrojn Miguel Benton kaj nian samideanon Givalnido el Brazilo*

## Odo Feliks Kazimierz BUJWID (1852-1942)

Odo naskiĝis en Vilno, Litovio, la 30an de novembro 1857 kaj mortis en Krakovo la 26an de decembro 1942.

Ekde 1893 ĝis 1920 li estis la unua pola bakteriologo, pioniro pri higieno kaj sanitara preventado, unu el la unuaj sciencistoj de sia lando en la produktado de vakcinoj, inter kiuj tiu kontraŭ rabio. Kiel profesoro li instruis en la universitato de Krakovo.

Li vizitis la medicinan fakon en la Varsovia Universitato, kie li renkontis Zamenhof: ili iĝis amikoj kaj tiaj ili restos ĝis la morto, en 1917, de la iniciatoro de Esperanto. Li fariĝis vigla aktivulo sine de la esperantista movado, pli-malpli unu jaron antaŭ la komenco de la 8a Internacia Kongreso, kiu okazis en 1912, en Krakovo.

En Berlino, estante ankoraŭ studento, li ĉeestis en kurso pri bakteriologio gvidata de Robert Koch, dum kiu li lernis la metodologion kultivi laboratorie bakteriojn. Reveninte en Varsovio, li starigis laboratorion en sia loĝejo kaj identigis la responsan bakterion de tuberkulozo.

En 1886 li ekstudis en Parizo la metodikon de profilaktika vakcinado kontraŭ la rabio, kune kun profesoro Louis Pasteur, pioniro de mikrobiologio, inventinto de la metodoj pasteŭrizado (laŭ lia nomo) kaj fermentado, li ankaŭ estis bioĥemiisto kaj eĉ talenta pentristo.

De tiam estis rekonita, tutmonde, lia granda talento kiel sciencisto kaj elserĉisto. El lia plumo eliĝas pli ol 380 sciencaj artikoloj kaj eseoj en la sekvaj lingvoj: pola, franca, germana, rusa kaj **ankaŭ Esperanto**. Li deziris kundividi siajn sciojn kaj eltrovojn kun iu ajn interesata al la studado de mikrobiologio kaj bakteriologio.

En 1914 O. Bujwid ricevis de la Ministerio pri Militaj Aferoj la rangon de Kolonelo-medicinisto kaj oni taskigis lin provizadi la armeon per vakcinoj kontraŭ tifo kaj ĥolero.

Kune kun sia edzino, Kaziemira Bujwidowa (Varsovio-1867; Krakovo-1932), feministino, do fervora batalantino por la rajtoj de virinoj, i.a. koncerne aliron kaj studadon al universitatoj, li ekorganizis prelegojn kaj kursojn, koncerne higienon kaj socialajn sciencojn.

Malgraŭ intensa kaj ampleksa aktivado en la scienca kampo, ĉirkaŭ 1911 prof. Bujwid ekdediĉis sin al Esperanto kun granda fervoro kaj entuziasmo, kaj prenis sur sin la rolon de prezidanto de la Organiza Komitato por la 8a Internacia Kongreso de Esperanto en Krakovo (11-18 aŭgusto 1912), 25 jarojn post la apero de la lingvo (1887).

Danke al siaj rilatoj kaj konoj ene de la instituciaj medioj, li ofte akiris avantaĝojn por Esperanto kaj ankaŭ por la esperantistoj, kiel, ekzemple, plifaciligon de la burokrataĵoj por ricevi pasportojn aŭ/kaj vizojn.

En 1926 li iĝis prezidanto de la Nacia Asocio kaj de ISAE ( Internacia Scienca Asocio Esperanta).

## Tipo C1 – Esperanto – medaloj

Odo Bujwid (1857 - 1942)



Lando: Pollando  
Metalo: bronzo  
Diametro: 78 mm  
Jaro: 1977

Kvanto: *serĉata*  
Pezo: 161 g  
Konceptinto: Viktor Wolf (per AI)  
Diko: 3 mm

### ***Averso:***

ĉirkaŭe: “ODO BUJWID 1857 - 1942” (literoj supre, ĉirkaŭe nekompletaj!)

meze: busto de Odo Bujwid, vizaĝo maldekstren

### ***Reverso:***

maldekstre: komponaĵo simila al mikroskopaj strukturoj (ekz. bakteriaj kolonioj aŭ mikroorganismaj kulturoj)

sube: la Niksino (akva feino); figuro de la varsovia blazono

dekstre: plaketo en la pola:

W 50 LECIE  
POLSKIEGO  
TOWARZYSTWA  
MIKRO  
BIOLOGÓW

=>

JE LA 50-A DATREVENO  
DE LA POLA  
SOCIETO DE  
MIKRO  
BIOLOGOJ

WARSZAWA 1977

VARSOVIO 1977

### ***Rimarko:***

Odo Bujwid ankaŭ estis la aŭtoro de medicinaj verkoj en Esperanto.

*La redakcio tutkore dankas Maria Niemyjska el Bjalistoko pro la sendo de multaj pliheliĝantaj informoj*

En 1927-28 li vojaĝis al Brazilo kiel reprezentanto de sia lando, por studadi la problemojn de polaj migrintoj kaj koloniistoj kaj iliajn reagojn al tropikaj malsanoj. Kompreneble li estis akceptata entuziasme de pluraj esperantistaj asocioj, kie li prelegis eĉ antaŭ ministroj kaj deputitoj, lokaj scienculoj kaj ĵurnalistoj.

En 1931, en Krakovo okazis la 23a Universala Kongreso (UK): O. Bujwid proponis al Ŝtatprezidanto *Józef Piłsudski* la kongresan patronecon, kiun tiu bonvoleme akceptis. La pola prezidanto, jam de longa tempo estis deklarinta siajn favoran opinion kaj estimon pri la Internacia Lingvo. Prezidanto de la Loka Organiza Komitato estis, kompreneble, prof. Bujwid. Nekalkuleblaj estas liaj iniciatoj por la disvastigado de Esperanto kaj subteno de la movado.

Sekve de lia interesiĝo, la pola radio komencis paroli pri kaj en Esperanto, proponante prelegojn pri diversaj temoj, kiujn Bujwid mem prezentis.

Jam en 1913, li fariĝis kunredaktanto de la revuo *Pola Esperantisto* (fondita en 1908) kunlabore kun aliaj famaj esperantistoj, el kiuj menciindas la fratoj de Ludoviko Zamenhof, Leono kaj Felikso, kaj la filo Adamo. La redakteamo havis sian sidejon en Varsovio.

La eldonado de *Pola Esperantisto* estis haltigita komence de la unua mondmilito: la periodaĵo reatingis sian legantaron en 1922. De tiu jaro ĝis 1938, O. B. reprenis sur sin la rolon de redaktanto kaj finance helpadis, por ke la revuo aperu regule kaj akurate. En 1935 li partoprenis en la 27a UK en Romo, Italujo.

Dum la pasado de la jaroj li ricevadis multajn rekonojn pro sia multfaceta aktivado esperantista: li iĝis membro de la Lingva Komitato kaj poste de la Akademio de Esperanto, estis elektita Honora Membro de UEA kaj poste honora prezidanto de la Internacia Scienca Asocio Esperanta. (ISAE). En 1937, 80-jara, li partoprenis en la 29a UK en Varsovio kiel Honora Prezidanto.

En 1942 li mortis, en Krakovo, je la aĝo de 85 jaroj, postlasante neplenigeblan vakuon. En pluraj ĵurnaloj aperis multegaj nekrologoj skribitaj de institucioj, asocioj, kolegoj kaj ankaŭ simplaj esperantistoj, kiuj havis la ŝancon konatiĝi kun li kaj sekve lin aprezi. En *Esperanto Internacia*, organo de UEA (Universala Esperanto-Asocio), oni publikigis longan artikolon, kiu koncize trairis liajn plej gravajn viv-etapojn, kaj en la scienca kampo, kaj en tiu de la Esperanto-movado.

La artikolo tiel ĉi finiĝas:

*“... forpasis unu el la plej konataj kaj amataj el tiuj, kiuj laboris por Esperanto en la lando de ĝia naskiĝo: kaj, kiel la Majstro mem, li mortis en periodo, kiam en tiu lando la aktualaj cirkonstancoj kontraŭas ĉion celatan de Esperantismo. Tamen tio ne daŭros, nek pereos la laboro kaj influo de Odo Bujwid”.*

**Noto:**

la materialo rilatanta Esperanton, originala, ĝis nun prezentita en la ekzemplodona tt-ejo IL POSTALISTA, estas nur parto de la kolekto pri la internacia lingvo Esperanto de Elda Doerfler.

## Tipo C6 – Ordenaspektaj medaloj

Jubilea medalo 1887 - 1987 Piso - Varsovio



Lando: Italio  
Metalo: bronzo  
Diametro: 35 mm  
Jaro: 1987



Kvanto: *serĉata*  
Pezo: 19,87 g  
Medalisto: *serĉata*  
Diko: 3 mm

### ***Averso:***

supre: Esperanto-stelo

ĉirkaŭe: “VARSAVIA – PISA” (itale) / 1887 – 1987

meze: CENTENARIO (itale)

ESPERANTO

### ***Reverso:***

ĉirkaŭe: perlorando

supre: “PROVINCIA DI PISA” (itale)

meze: blazono de la provinco Piso en Italio →



### ***Rimarko 1:***

centenario (itale) = centjariĝo

### ***Rimarko 2:***

supre, la medalo havas originalan “okuleton” aŭ “ponteton” por ĉeno aŭ rubanda ĉenero

# *SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ*

## Numismatiko en Kabindo (Angolo)

Fine de la 15a jarcento, portugaloj esploroj alvenis al la Regno Kongo. Tiutempe, Kongo havis geografian areon korespondantan al la okcidenta flanko de la nuna Kongo. La portugaloj formis aliancon kun Kongo: unu liveris dungosoldatojn por militoj, la alia sklavojn. Tamen, la sklavkomerco kondukanta al Brazilo poste kaŭzis konfliktojn inter la du partioj. La Regno Kongo estis vastigita. En la 17a jarcento, la konflikto kun Portugalio pligraviĝis, ĉefe pro la agresema sinteno de la guberniestroj de Angolo.

Ĝis nun Kabindo estas provinco de Angolo. Ĝi havas nur 7270 km<sup>2</sup>, do la saman grandecon kiel du belgaj provincoj. La loĝantaro estas 716 000. Geografie, Kabindo estas tute aparta de Angolo, ĝia eksklavo. Ĝi situas ĉe la okcidenta marbordo de Afriko, ĉe la Atlantika Oceano, kaj estas inter mallarĝa strio en la sudo de Kongo-Kinŝaso (Zairio) kaj Kongo-Brazavilo en la oriento kaj nordo. La Patrujo Angolo kuŝas nur 20 km sude de Kabindo, kun Kongo-Kinŝaso okupanta malgrandan strion inter ili. Kabindo ne estu konfuzita kun la urbo Kabindo en la provinco Lomami en Kongo-Kinŝaso. Sekcio de la rivero Kongo formas la sudan limon inter Kongo kaj Angolo.

Kabindo estis establita ĉe la Berlina Konferenco en 1885 kaj nomita Portugala Kongo. En 1933, Portugalio distingis inter la kolonio de Angolo (ankaŭ nomata Portugala Okcidenta Afriko) kaj la protektorato de Kabindo. Tamen, en 1956, la administrado de Kabindo translokiĝis al Angolo. Antaŭe, en 1951, Angolo estis konsiderata transmara provinco de Portugalio. En tiu kunteksto, Kabindo estis rigardata kiel ordinara distrikto de Angolo. Sub portugala regado, Kabindo estas grava centro de agrikulturo kaj forstado. La jura distingo inter Angolo kaj Kabindo estas reasertita de Portugalio en 1971.

Post la Revolucio de la Diantoj en Portugalio (1974), multaj politikistoj evoluigis intereson pri la aparteno de Kabindo al Angolo, ĉar tiu lando estas ankaŭ portugala kolonio kaj sendependiĝis en 1975. Kabindo sendependiĝis de Portugalio en novembro 1975, kiam ĝi secesiis de sia iama patrujo, Portugalio, kies protektorato ĝi estis kaj kiu estis okupita de la angola armeo. Tamen, ekzistis ankaŭ kontraŭmovado, la FLEC, celanta apartigi Kabindon de Angolo per milito, ĉar Angolo batalis kontraŭ la angola MPLA. Rezulte, multaj homaj-rajtaj malobservoj estis raportitaj en 2003. En 2006, interkonsento estis subskribita kun Angolo, en kiu al Kabindo estis donita speciala statuso. La pacnegocadojn akceptis Usono, Rusio kaj la Eŭropa Unio, same kiel ambaŭ Kongoj, Japanio kaj Sud-Koreio, kaj la Afrika Unio (establita en 1999 kiel la posteulo de la Organizaĵo por Afrika Unueco, al kiu 55 afrikaj ŝtatoj estas aligitaj). Sed la problemoj daŭras ĝis hodiaŭ.

Apud la marbordo, ekzistas gravaj naftoborejoj, kiuj estas inter la plej grandaj en la mondo. Ili estas esplorataj ekde 1954 kaj spertas signifan produktadon ekde 1968. Kun 700 000 bareloj da nafto ĉiutage, ĝi provizas proksimume 70% de la angola ekonomio kaj respondecas pri 80% de la eksportaĵoj. Konataj naftokompanioj kiel Chevron, Elf kaj Agip kune posedas 60% de la produktado. Ĉirkaŭ 5 000 homoj laboras en ĉi tiu ekonomio, kaj 1 700 fremduloj, ĉefe usonanoj,

loĝas tie konstante. Krome, Kabindo produktas durlignon, kafon, kakaon, kaŭĉukon kaj palmoleajn produktojn.

**Moneroj el Kabindo estas konsiderataj ĵetonoj, novaĵmoneroj, neoficialaj kaj kolektaĵoj por numismatoj**, ĉar la provinco ankoraŭ apartenas al Angolo kaj ili ne estas laŭleĝa pagilo. La valuto estas la eskudo, subdividita en 100 cendojn. Nuntempaj inflaciaj valutoj en 2016 estas denominaciitaj en realoj (komparu la nomon kun la brazila reio kaj la hispana realo aŭ realoj).

“Moneroj” kaj “monbiletoj” el Kabindo



Peter Budai

#### Bibliografio

<https://en.wikipedia.org/wiki/Kabinda>  
[https://nl.wikipedia.org/wiki/Cabinda\\_\(provincie\)](https://nl.wikipedia.org/wiki/Cabinda_(provincie))  
[https://en.wikipedia.org/wiki/Cabinda\\_Province](https://en.wikipedia.org/wiki/Cabinda_Province)  
[https://en.wikipedia.org/wiki/Republic\\_of\\_Cabinda](https://en.wikipedia.org/wiki/Republic_of_Cabinda)  
<https://nl.wikipedia.org/wiki/Portugees-West-Afrika>  
[https://en.wikipedia.org/wiki/List\\_of\\_rulers\\_of\\_Kongo#Pretenders\\_to\\_the\\_throne\\_since1914](https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_rulers_of_Kongo#Pretenders_to_the_throne_since1914)  
<http://chiefacoins.com/Database/Micro-Nations/Cabinda.htm>

*Ni sincere dankas nian novan membron Peter Budai el Belgio pro la interesa kontribuaĵo!*

## ***POR SPUREMULOJ!***

*En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion.*

**XXa enigmo ( Bonvolu, se eble, informi nin per klarigoj ) DANKON!**



Ambaŭ objektoj troviĝas en la “Esperanto-urbo” Herzberg am Harz. Mankas bedaŭrinde priskriboj kaj dimensioj!!!

# ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

## “Nordia Oro ...

... ne efektive vera oro, sed orbrila alojo de kupro kaj aliaj metaloj!”

---

Nordia Oro estas orkolora alojo uzata ĉefe por monerfarado. Malgraŭ sia nomo, ĝi ne enhavas oron. Ĝi estas tipo de aluminio-bronzo, kiu estas alojo de kupro, aluminio, zinko kaj stano. Moneroj faritaj el ĉi tiu alojo havas brilan aspekton, kiu rememorigas oron. Ili estas rezistemaj al makulado kaj aliaj eksteraj ŝanĝoj, kaj facile formiĝas dum produktado. Estante nemagnetaj, ili helpas monermaŝinojn detekti falsaĵojn.

La eminenta skandinava metalurgia sciencistino kaj esploristino **Mariann Sundberg (\*1943)** lasis neforviŝeblan spuron ĉe moderna numismatiko. Ŝia laboro havas la plej striktan ligan kun numismatiko kaj moneroj. En 1991, laborante por la finna metalurgia kompanio Outokumpu Oyj, ŝi evoluigis la mondfaman nordian (svedan) or-alojon, origine por la Sveda Monfarejo (Myntverket). Tiutempe, la Sveda Monfarejo petis novan alojon por sia propra 10-krona monero, specifante plurajn ecojn. Ŝi deziris, ke la monermetalo havu brilan oran koloron, reziston al malheliĝo (t.e. perdon de brilo), muldeblecon pro teknike facila monfarado, kaj plej grave, ke ĝi ne kaŭzu haŭtajn alergiojn, male al nikelo, kiu estas alergena. La teamo gvidata de Mariann Sundberg sukcesis en sia serĉado. Ili testis malsamajn alojkonsistojn kaj trovis, ke la plej bona estis kombinaĵo de kupro kaj aluminio, zinko kaj stano. La problemo estis solvita anstataŭigante nikelon per kombinaĵo de zinko kaj stano. Tio plenumis la postulojn de la monfarejo. Interalie, la alojo ankaŭ ebligas la monfaradon de kompleksaj ŝablonoj. Kelkaj metaloj tradicie uzataj por monfarado povas kaŭzi alergiajn reagojn, kio limigis iliajn eblecojn.



*Svedio, Karlo la 16a Gustavo, 10 kronoj, monfarita en 1991-2000*

### La konsisto de “Nordic Gold” estas jena:

kupro (Cu) 89 %, Aluminio (Al) 5 %, Zinko (Zn) 5 %, Stano (Sn) 1 %.

Aluminio ludas gravan rolon en la aloj – ĝi signifas pliigas la mekanikan reziston kaj malmolecon de mola kupro. Krome, ĝi kreas tre maldikan, trasideblan kaj ekstreme stabilan tavolon de aluminio-oksido sur la surfaco, kiu protektas la moneron kontraŭ profunda korodo, same kiel surfaca oksidiĝo (nigriĝo). La koloro kaj specifa pezo de la aloj diferencas de pura oro, kaj kompare kun komerca kupro-metaloj, ĝi havas signifas pli malgrandajn grajnoj. Post abrazia polurado, maldika oksida materialo kreiĝas. Kiel jam menciite, la aloj estas ne-alergia, ŝimo-rezista kaj iagrade, danke al kupro, antimikroba, precipe post abrazio.

Moneroj faritaj el ĉi tiu aloj havas specifan, se paroli metafore, elektromagnetan signaturon esprimatan per la valoro de elektra konduktiveco, kiu faciligas kontroli ilian kvaliton kaj aŭtentecan. Tio malfaciligas falsadon de moneroj. Alia obstaklo al falsado estas la malfacileco fandi la kvar metalajn elementojn ekster industria medio kaj la alta kosto de produktado de la aloj.

### Uzante Nordian Oron por moneroj (ekzemploj):

por cirkulaj moneroj la monermaterialo estas tre populara kaj vaste uzata, ĉar ĝi ne enhavas nikelon kaj konservas sian brilon.

Moneroj en valoroj de 10, 20 kaj 50 eŭrocendoj kaj 1 kaj 2 eŭroj estas parto de la monsisistemo de la eŭrozono ekde 2002. La unuaj tri valoroj estas faritaj el aloj de Nordia Oro. La 2-eŭra monero havas periferian parton faritan el Nordia Oro, “ringon” oni povus diri, dum la 1-eŭra monero havas centran diskon faritan el Nordia Oro.



## Uzoj de la alojo en la mondo:

Nordia Oro, ankaŭ nomata alumina bronzo, estas uzata aŭ estis uzata de dekoj da landoj, ekzemple por la pola monero de 2 złotoj (vidu la suban bildon) kaj elektitaj moneroj en Argentino kaj Hungario. Ĝi ankaŭ estis uzata por aŭstraliaj kaj novzelandaj moneroj de 1 kaj 2 dolaroj, por meksikaj moneroj de 20 kaj 50 centavoj, antaŭ 2009, kaj por la centraj diskoj de bimetalaj meksikaj moneroj de 1, 2 kaj 5 pesoj, la filipina monero de 10 pesoj, la kanada monero de 2 dolaroj (“toonie”) kaj la eksteraj ringoj de meksikaj moneroj de 10, 20, 50 kaj 100 pesoj. Aliaj monfaradoj fine de la 1950aj jaroj estis la hispana monero de 1 peseto kaj la armena monero de 200 dramoj. Mi ne montras individuajn monerojn ĉi tie, ĉar ili facile troveblas en Interreto.



①

②

1 - Svedio, Karlo la 16a Gustavo, 50 kronoj 2005

2 - Pollando, 2 zł. 2010 - Batalo de Grunvald (en 1410)

## Aliaj uzoj:

la alojo ankaŭ estis studita por antimikroba uzo en hospitaloj, por helpi preventi MRSA-infektojn - mallongigo por Methicillin-rezista Staphylococcus aureus, bakterio respondeca pri malfacile trakteblaj infektoj en homoj kaj bestoj.

Josef



*Kompilis kaj esperantigis Josef Křiž.*

*Multan dankon kara samideano!*

# VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

LOTERIO JUGOSLAVIA / ESPERANTO - ASOCIO - LIGO







## ***MEDALISTOJ***

František David (1913 – 2002)



David estis ĉeĥa skulptisto, medalisto, ksilografo, arkitekto kaj pedagogo.

Li studis en la Akademio de Artoj en Prago de 1935 ĝis 1939. En la epoko 1950 – 1973

li estis instruisto pri arkitekturo, arto kaj dezajno. En 1970 F. David doktoriĝis pri modlo-arto.

En 1978 li ricevis registaran distingon kiel “Meritplena artisto”.


Li iĝis fama pro la kreado de naciaj moneroj kaj rememoraj moneroj, kiel tiu je 50 kronoj honore al Kosta Neumann, *jam priskribita en jk. 11, n-ro 3, p. 7.*



La moneroj surhavas, surbaze de lia nomo, la inicialojn D aŭ FD

# HISTORIAJ ASPEKTOJ

## Ŝtonoj de YAP



Ĉi tiu impona ŝtono estis ofta pagilo sur la insulo Yap en Mikronezio. Pagi per ŝtonoj, kiuj pezis ĝis ses tunojn, ŝajnas aparte malfacile, sed por la loĝantoj de Yap tio ne estis problemo. La plej grandaj ŝtonoj ja ne estis movataj. Dum transakcioj tiuj ŝtonoj ŝanĝis posedanton, sed ne sian lokon. **Kiel en nia nuna mona sistemo, ĉi tiu sistemo baziĝis sur fido.** Tre moderna do!

Ĉiu ŝtono estis unika, sed ĉiuj estis ĉizitaj en rondajn diskojn kaj truo estis farita en la centro por pli facile movi ilin. La uzata materialo estas **aragonito**, roko ne trovata sur Yap, sed sur la insulo Palaŭo (400 km for). La valoro de la ŝtonoj estis determinita de diversaj ecoj, kiel la grandeco, la perfekteco kaj la historio.

Hodiaŭ la usona dolaro estas la normo por ĉiutagaj pagoj, sed la ŝtonoj ankoraŭ povas esti uzataj por ritaj transakcioj.

Eble vi surpriziĝos, sed la ŝtono, kiun vi povas trovi en la Belga Nacia Banko, hodiaŭ ankoraŭ estas valida pagilo sur la insulo Yap, kiu troviĝas en Mikronezio. Turistoj, kiuj vizitas la insulon ofte miras, ke la homoj en Yap simple lasas sian monon sur la strato. Kaj ĉi tie ne temas pri 'malgrandaj moneroj'. La plej grandaj ekzempleroj povas havi diametron de kvar metroj kaj pezi ses tunojn. Kie do eble troviĝas la origino de ĉi tiu nekutima monotipo?



*Transporto de ŝtonoj de Yap*

Antaŭ kelkaj jarcentoj, la insulanoj de Yap veturis al la najbara insulo Palaŭo, kiu troviĝas 400 kilometrojn for. Tie ili malkovris specialan rokon: **aragoniton**. Ĉar aragonito (kiu ankaŭ troviĝas en perloj) ne ekzistis sur la insulo Yap, la Yapanoj elhakis grandajn pecojn de ĉi tiu ŝtono en la kavernoj de Palaŭo. Poste el ĉi tiuj ŝtonoj la Yapanoj formis diskegojn kaj en la mezo ili faris truon, por ke ili povu pli facile transporti la ŝtonojn trans

la teron per bastonoj. La Yapanoj devis poste transporti la ŝtonojn al la insulo Yap per bambuflotoj tirataj de kanuoj. Post iom da tempo ili decidis uzi tiujn diskegojn kiel monon kaj la ŝtonojn ili nomis **rai**.

La vojaĝo de Palaŭo al Yap en la pasinteco tamen portis tre multajn danĝerojn. Multaj vundiĝis aŭ perdis sian vivon dum la transmaraj vojaĝoj. Ĉar la riskoj kaj do ankaŭ la viktimoj dum la vojaĝo kreskis, la valoro de la ŝtonoj ankaŭ pliiĝis. Resume, pro la danĝeroj de la boata vojaĝo kaj la malofteco de la materialo, tiuj ŝtonoj havis grandan valoron por la loĝantoj de Yap.

Vi eble demandas vin kiel oni precize taksis la valoron de ŝtono? Krome al la speciala beleco de la ŝtono kaj la historio de la ŝtono mem (t.e. aĝo, nombro de viktimoj, malfacileco elfosi) la grandeco de la ŝtono estis grava por determini ĝian valoron, same kiel la socia statuso de la partioj en la interŝanĝo. Ŝtonoj, kiuj cirkulis en la manoj de gvidantoj, ekzemple, estis pli valoraj ol tiuj, kiujn ordinarnaj homoj posedis.

Post 1931, fakte ne estis faritaj novaj ŝtonoj. Ĉar la ŝtonoj pro sia grandeco kaj pezo ne estis tre praktikaj kiel pagilo, ekde la 20a jarcento, sur Yap oni uzis la usonajn dolarojn por malgrandaj ĉiutagaj pagoj. La pago por grandaj aĉetoj, kiel domoj aŭ terposedoj, hodiaŭ ankoraŭ foje okazas per ŝtonmono.

La aragoniŝtonoj ankaŭ estas uzataj por reguligi kompensojn.

Tre rimarkinde estas la maniero, laŭ kiu en la pasinteco (kaj eĉ hodiaŭ por grandaj aĉetoj) komercaj transakcioj okazis en Yap. Kiam ŝtono transiris de la malnova posedanto al la nova, ĝi plej ofte ne estis movita. Do la ŝtonoj restis simple sur sia originala loko sur la insulo: laŭ la vojo, apud domo, antaŭ komunuma konstruaĵo...

Ŝtelo de rai nur malofte okazas, ĉar la insulanoj praktikas grandan socian kontrolon unu super la alia. Plej multaj homoj en Yap scias kiuj estas la posedantoj de la ŝtonoj kaj multe respektas aliulajn posedaĵojn. Kaj krom tio, ĉu vi povas imagi kiel senprobleme ŝteli ses-tunan ŝtonon?



*La ŝtono de Yap konservata en la Muzeo de la Nacia Banko de Belgio*

#### Bibliografio:

- CORA Lee C., "Stone Money of Yap: A Numismatic Survey." in Smithsonian Studies in History and Technology, pp. 1–75, 1975.
- LAUTZ, T., *Steinreich in der Südsee. Traditionelle Zahlungsmittel in Mikronesien*, Cologne, 1999.
- Lautz, T., "The world's most curious money" Huge stone discs used on the Micronesian island of Yap : a summary of field studies" in Money and Identity. Lectures about History, Design and Museology of Money [Proceedings of the 11th Meeting of the International Committee of Money and Banking Museums (ICOMON), Seoul, 2004], Hannover, Reiner Cunz, 2007, pp.105-127.

**Kontribuaĵo: Herman Deceuninck**

**Prilaborado: Bert**

# TERMINARO

## Alfabeta listo (47)

**abandonado (rajto pri):** *la rajto cedi al la asekuristo objekton aŭ tion, kio restis el ĝi post katastrofo, kaj anstataŭe postuli la plenan asekuritan sumon.*

**aĉetfakturo:** *kiam komisiito plenumis komision pri aĉeto, li sendas al sia komisiinto tian fakturon kune kun la varoj.*

**administrado:** *ordigita raportado por la direkcio pri la irado de la entrepreno. Pli vasta nocio ol librotendado, kiun oni ankaŭ nomas "financa administrado". Ampleksas ankaŭ buĝetadon, internan statistikon, arkivlaborojn ktp.*

**akcepta kredo:** *formo de traktado kredo, laŭ kiu la banko rajtigas la kreditorojn trakti sur ĝi sume de la kredo petita. La kreditoroj povas diskontedoni ĉi tiun traktadon, t.e. monigi ĝin.*

**akcepti (traktado):** *devontigi sin pagi la traktadon sumon*

**akcepto pro honoro (= honora akcepto):** *se paroli pri traktado ĉe neakcepto: komerca konato de la traktado aŭ unu el la endosintoj povas akcepti*

**akcepto:** *deklaro en traktado fare de la traktado kaj subskribita de li, ke li plenumos la pagordonon faritan al li de la traktado*

**aktivaj valorpaperoj:** *akcioj, kambioj ktp, kiuj havas grandan merkaton.*

**aktuario:** *matematikisto, kiu ordinare estas en la servo de asekurkompanio, por kalkuli la premiojn*

**blanka akcepto:** *akcepto de traktado, en kiu la sumo estas ankoraŭ menciota konto; kalkulo ordinare kun debeto kaj kredita flankoj*

**CNC** (angle: Computerized Numerical Control) = *Komputila Cifereca Regado. CNC-maŝinoj kapablas aŭtomate produkti objektojn kun alta precizeco, eĉ por kompleksaj formoj, per la uzo de regada teknologio.*

**super alparo:** *kurzo kiu estas pli alta ol 100%*

**super nominala valoro:** *> super alparo*

**vendofakturo:** *kiam komisiito plenumis komision pri vendo, li sendas al sia komisiinto tian fakturon kune kun la varoj*

## La futuro de mono: preter avido kaj malabundo

“La Futuro de Mono” (originala titolo: “The future of Money: Beyond Greed and Scarcity”) estis en 2001 verkita de Bernard Lietaer. La libro temas pri la funkciado de mono kaj de la financa sistemo, de la efikoj de nuntempaj paradigmoj pri mono kaj la avantaĝoj de alternativaj aŭ komplementaj valutoj, t.e. ne-oficialaj valutoj (ISO-normo 4217), kiuj estas aŭ estis uzataj kiel pagrimedo. Kelkaj estas lokaj aŭ regionaj, aliaj estas tutmondaj valorunuoj por la interŝanĝo de varoj kaj servoj en loka interŝanĝa sistemo, ankaŭ praktikata ekzemple kadre de la Esperanta Civito en formo de tempobanko, kiu ekfunkciis la 8an de marto 2013 kaj kies oficiala nomo estas “Pasvorta Reto”.

### Enhavo de la libro

#### Parto 1: “Kio estas mono”

Superrigardo de la financa sistemo kaj kiel mono funkcias. Ĝi finas per kvin scenaroj, kiuj spekulas pri tio, kio povus okazi se la nuna monsisistemo kolapsus.

#### Parto 2: “Elekti vian futuron de mono”

Superrigardo de diversaj ekzistantaj valutoj. Komplementaj valutoj estas dividitaj en “labor-ebligajn valutojn”, kiel ekzemple *Wära* (germana regiona kaj kvazaŭ stabila mono uzita en 1920) kaj *Ithaca Hour*, kaj komunumaj valutoj uzataj en Loka Interŝanĝa Sistemo.

Lietaer ankaŭ provizas ekzemplojn de “entreprenaj valutoj” por limigitaj rimedoj kiel manĝkuponoj aŭ flugmejlaj (*Frequent Flyer Miles*), programo por ofta flugado. Alia rimarkinda mono estas artmono (*Art money*), per kiu artisto povas parte vivi per artmono, kiam li intencas aĉeti en sia tuja ĉirkaŭaĵo per artmonaj biletoj (*AM*), aŭ kiam li povas pagi kvaronon de la prezo de nova lavmaŝino per AM.

En 1971, Jaime Lerner, la urbestro de Kuritibo (*Curitiba*) en Brazilo, ekfunkciigis la ekonomion de la urbo kaj solvis du gravajn sociajn problemojn per eldono de valuto en la formo de ĵetonoj uzeblaj por bustransporto. Akiri ilin eblis per kolektado kaj ordigado de rubaĵoj. Tiaj projektoj helpis al Curitiba fariĝi unu el la plej prosperaj urboj en Brazilo.

*Fonto: Vikipedio*

*La redakcio denove kore dankas nian membron Herman Deceuninck pro la sendo de la elvikipedia teksto.*



Sviatoslav Mykolaiovych Fedorov (1927-2000) (Fig. 110-113) was born in Proskurov (now Khmelnytskyi), Ukraine, spent his childhood years in Kamianets-Podilskyi, graduated from the Medical Institute of Rostov, and, while working at the Chuvash Branch of the Helmholtz Institute of Eye Diseases in Cheboksary, became the first to perform intraocular lens implantation in the USSR. He became head of the Research laboratory of experimental and clinical eye surgery in 1974 and the Moscow Research Institute for Eye Microsurgery in 1980, and founded the Eye Microsurgery Complex, an inter-branch scientific and technical establishment (Figs. 7-9) in 1986.

There were famous foreign ophthalmologists who, at some point of their live, were associated with Ukraine.

Thus, born in Minsk, Ivan Ustynovych Zdanovych (1864-1915) (Figs. 114-115), a Belarusian philanthropist and public figure, after graduating from the medical school at the St Volodymyr University of Kyiv, had advanced training in ophthalmology in Kyiv. He was appointed as a physician to the village of Loshnytsa, Borysiv district, in 1890, and worked as a chief physician at the Minsk Provincial Zemstvo Hospital since 1904.

The Polish physician Jan (Johann) Mikulicz-Radecki (1850-1905) (Fig. 116-117) was born at the Ukrainian town of Chernivtsi. He received his education at the medical school at the University of Vienna and simultaneously at the conservatory of Vienna with a specialty in piano, was a director of surgery at the Jagiellonian University of Krakow, the University of Konigsberg (1887-1890), and the University of Breslau (1890-1905) and an inventor of ocular surgical instruments, and described bilateral swelling of salivary and lacrimal glands, called Mikulicz's syndrome.

Dr Ludwik (Lejzer) Zamenhof (1859-1917) (Figs. 118-127), the creator of the artificial language of Esperanto, was born in Bilostok, graduated from the medical school at the University of Warsaw, received advanced training in ophthalmology in Vienna, and practiced ophthalmology in the Ukrainian town of Kherson from 1889 to 1990.

In conclusion, it is noteworthy that the main objective of historians of medicine is to commemorate outstanding medical personalities. History of ophthalmology is an essential part of studying ophthalmology. As was noted by R.L. Stevenson (1850-1894), the Scottish writer, "the memories are a fairy gift which cannot be worn out in using", and, in the words of Oscar Wilde (1854-1900), the English writer, "the only duty we have to history is to rewrite it". Unfortunately, up to date, eminent oculists of the past have been not sufficiently commemorated by issues of numismatic pieces. Hence, it is our hope that in the future, a systematic approach to this matter as well as the purposeful promotion of the achievements of national ophthalmology by numismatics will be used, to provide a clear example for studying the history of ophthalmology and enhance the educational attainment of doctors. We look forward to the appearance of new interesting materials of such small forms of fine art.

## References

1. Sarkisov AS, Sarkisov SA. [The origins of Moscow ophthalmological society]. *Vestn Oftalmol.* 2018;134(6):129-132. doi: 10.17116/oftalma2018134061129. Russian.
2. Laios K, Karamanou M, Chatziioannou A, Nikolopoulos T, Moschos MM, Androutsos G. Views on ocular cancer in Arabo-Islamic medicine and the leading influence of the ancient Greek medicine. *J BUON.* Jan-Feb 2016;21(1):276-8.

# ***R E T P O Ŝ T O***

de vi por ni!

## **Reagoj kaj konversacioj**

13.07.2026 11:54

*Kara Jozefo!*

*Mi esperas, ke vi kaj via familio fartas bone.*

*Iom pli malrapide ol kutime mi sendas per Wetransfer al vi la provlegendan version de la tria revuo, esperante, ke vi nuntempe ne estas tro okupata pro esperantaj aŭ aliaj taskoj.*

*Jam de longe mi aprezas senĉese vian subtenon de la ENA-projekto kaj milfoje mi dankas vin kaj deziras al vi agrablajn feriojn.*

*Amike kaj numismatike,*

*Bert*

26.07.2026 14:29

Jen la provlegita ENA-revuo. Mi miras, ke vi ne ricevis ĝin, en la tempo, kiel kutime, mi sendis ĝin per wetransfer. Mi ne komprenas la aferon. Cetere mi fartas bone, dank' al Dio.

Amike: Jozefo

26.07.2026 16:58

Kara Bert,

per Wetransfer mi estis sendinta al vi la kontrollegaĵon, laŭ mia memoro la duan aŭ trian tagon post la ricevo, same per Wetransfer, do mi ne scias, kial vi ne ricevis ĝin. Ĉu eble mi miskribis la retpoŝtan adreson? Se tiel, pardonu min!

Ĉar cetere mi fartas bone, se ne kalkuli la kaprican veteron.

Kun amikaj salutoj: Jozefo



14.07.2026 13:55

*Karaj samideanoj!*

*Mi denove volas danki vin pro la regula sendo de via revuo, kiu donas al mi daŭre panoramon pri viaj kanadaj esperanto-aktivecoj.*

*Miaflanke mi proponas ekde nun sendi al via movado nian revuon por danki vin unuavice, kaj varbilon hodiaŭ pri la fako "esperanto-numismatiko" por informi viajn membrojn kaj aliajn samideanojn. Aliĝo kun revuo estas kaj restos tute senkosta! Post dektri jarkolektoj ni fine esperas varbi la unuan kaj multajn aliajn kanadajn membrojn.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert Boon*

*ENA- iniciatinto kaj ĉefredaktoro*

14.07.2026 14:22

Saluton Bert,

Mi estas momente en Kroatio. Estis vendita bofamilia domo. Ni trovis multajn poŝtkartojn kaj jugoslavajn monbiletojn.

Ĉu vi venos al la UK en Graz? Ni povus kunporti.

Normand Fleury

15.07.2026 15:12

Saluton

Ĉu vi pensas ke tiuj biletoj valoras por kolektantoj?

Normand Fleury

15.07.2026 15:42

*Resaluton, Normand,*

*Certe. Dependas kian kolektotemon ili preferas. Ekzemple, la tria monbileto ankaŭ estas interesa por esperantistoj, ĉar la eksprezidento, Tito de iama Jugoslavio, subtenis la esperantan movadon...*

*Amike,*

*Bert*



15 07 2026 7:31

Kara S-ro Boon,

Antaŭ ĉio mi volas sincere danki vin pro la numeroj de la ENA-revuo. La informoj publikigataj en ili estas ĉiam tre interesaj kaj utilaj por kolektistoj, kiuj interesiĝas pri la historio de la Esperanto-movado kaj pri la kolektaĵoj ligitaj al ĝi.

Mi ŝatus proponi por publikigo en la plej proksima numero de la ENA-revuo «Esperanta Numismatiko» mian artikolon «Tri Esperanto-glumarkoj el mia kolekto: Stokholmo, CEKIT kaj Doksy».

En la artikolo mi rakontas pri tri nepoŝtaj Esperanto-glumarkoj, kiujn mi antaŭ relative nelonge bonŝancis aĉeti ĉe unu aŭkcio en Almato. Ili rilatas al la 26a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo en 1934, la Centro por Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo (CEKIT) en 1961, kaj la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy en 1956.

La artikolo enhavas fotojn de la tri ekzempleroj el mia kolekto, iliajn detalajn priskribojn, la historiajn informojn, kiujn mi sukcesis trovi, kaj liston de la uzitaj fontoj. Mi ankaŭ indikas kelkajn ankoraŭ nesolvitajn demandojn pri la aŭtoroj, presejoj kaj eldonkvantoj de tiuj kolektaj materialoj.

Al ĉi tiu mesaĝo mi kunsendas mian artikolon en Word-formato. Se necese, mi volonte adaptos aŭ mallongigos la tekston laŭ la redakciaj postuloj de la revuo. Mi povas ankaŭ aparte sendi la originalajn altdistingivajn bildojn.

Mi estus tre dankema, se vi povus konsideri la artikolon por publikigo en la plej proksima numero de ENA. Bonvolu sciigi al mi, ĉu la temo taŭgas por la revuo kaj ĉu necesas sendi pliajn informojn aŭ materialojn.

Kun samideanaj kaj kolektistaj salutoj,

Vjaĉeslav Nasretdinov  
Kazaĥio

15 07 2026 14:38

*Kara S-ro Nasretdinov, kara fidela ENA-membro!*

*Multan dankon pro la propono publikigi viajn multvalorajn kontribuojn en la ENA-revuo.  
Bedaŭrinde ili ne vere taŭgas por ĝi, ĉar ni nur havas temon pri markoj kaj biletoj kun (esperantaj)  
valorindikoj... "VALORMARKOJ & VALORBILETOJ"*

*Tamen, kiel kunlaboranto de la revuo "La Verda Lupeo" de mia amikino-filatestino Elda Doerfler en  
Trieste, prezidanto de ELF-Arek, mi estas preskaŭ certa, ke ili tre taŭgas por la revuo de tiu fakgrupo.*

*Mi do transsendos vian alvokon al ŝi, por ke ŝi povu mem interparoli kun vi! Sukceson!*

*Amike kaj numismate,  
Bert*

15 07 2026 17:59

Kara S-ro Boon,

Koran dankon pro via afabla respondo kaj pro via propono transsendi mian artikolon al sinjorino Elda Doerfler.

Mi tre ĝojos konatiĝi kun ŝi kaj estos sincere dankema, se mia artikolo povos esti publikigita en la paĝoj de la revuo «La Verda Lupeo».

Ankoraŭfoje multan dankon pro via helpo kaj subteno!  
Kun samideanaj kaj kolektistaj salutoj,  
Vjaĉeslav Nasretdinov  
Kazaĥio

15 07 2026 19:35

*Kara kunkolektanto,  
Tute ne dankinde. Mi deziras ne perdi nian kontakton!  
Amike kaj numismate,  
Simple nomu min Bert!*

20 07 2026 20:53

Karaj Bert kaj Vjaĉeslav  
Saluton al vi ambaŭ!

Mi tre ĝojas, s-ro Vjaĉeslav, konatiĝi kun vi kaj precipe ĝojas, ke vi estas fervora kolektanto. Bonvenon en nia rondo!

Bert transsendis al mi vian mesaĝon, kiu donis grandan plezuron al mi.

Vian artikolon mi legis kun intereso, la temo de vi traktita estas taŭga je publikigo, nur la enkonduka parto devus esti iomete ŝanĝita, ĉar legantoj de "La Verda Lupeo" ja bone konas signifon de "glumarkoj"! Mi - se vi rajtigas min! - faros la ŝanĝetojn kaj ĝin sendos, por ke vi aprobu mian alĝustigon. Mi ne scias, kiam mi havos eblon pretigi la venontan LVL-n, sed certe via artikolo trovos lokon en ĝi. Nur havu iom da pacienco ĉar mi estas ege okupita, krome estas *maljuna*.

Plej amike,

Elda

Brakumojn al Vivi, al Bert kaj ankaŭ al nova amiko Vjaĉeslav

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

30.07.2026 12:07

Kara Bert, koran dankon por la nova ENA-Revuo. Bv. pripensi, ĉu estas publikebla en la ENA-Revuo la artikolo, kiun mi sendas al vi almetite.

Salutas vin Josef Kříž Ĉefio.

30.07.2026 17:30

*Kara Josef,*

*multan dankon unuavice pro via agrabla reago koncerne la novan revuon. Krome dankon pro la sendo de la artikolo, kiu certe meritas lokon en la oktobra numero!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

30.07.2026 21:55

Dankon! ... se vi volas aldoni al la artikolo mian malgrandan foton (sed ne estas devige).

Salutas amike kaj numismate

Josef Kříž

31.07.2026 21:06

*Evidente, kara Josef!*

*Tiaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj...*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

07.08.2026 11:02

Kara amiko Bert, mi sincere dankas por la nova numero de la Numismatiko. Kvankam aktuale ĉe ni regas saharaj varmogradoj, mi kun intereso tralegis la ricevitan numeron. Kiel novaĵon mi almetas informon pri la medalo, kiu aperis okaze de mia 90a jariĝo.

Korajn salutojn!

Vlastimil Kočvara, Opava

07.08.2026 15:35

*Kara mia Vlastimil!*

*Permesu, ke mi unuavice sendas al vi korajn gratulojn kaj bondezirojn okaze de via 90a jariĝo!!!*

*Granda surprizo kaj numismatika evento estas la duflanka festa medalo. Mi intencas publikigi la priskribon kun fotoj en la oktobra numero. Do mi bezonas plejeble multajn informojn kiel koncerne la medalojn en nia rubriko **“MONEROJ & MEDALOJ”** en la de vi jam leginta nova numero.*

*Mi legis, ke ekzistas 50 ekzempleroj, do se eble mi dezirus mendi kaj aĉeti unu ekzempleron por mia kolekto. Se vi konsentus, mi bezonos vian adreson kaj la datumojn de via banko, do certe la numeron de via konto. Mi evidente pagos samtempe la sendokostojn por **registrita sendo**.*

*Amike kaj numismate,  
Bert*

12.08.2026 9:47

Saluton, kara amiko.

Jen mi sendas datojn pri anoncita medalo: diametro 48 mm, dikeco 3 mm, kvanto: 50 pec. latuno, 10 pec. arĝento, pezo arĝento 57 g, latuno 40 g, . projekto AI, monfarejo Zlatohorská mincovna (historia nomo Monfarejo Zuckmantel), . Rim.: En iama urbo Zuckmantel estis monfarejo, kiu poste malaperis. Nuntempe la privatulo renovigis la monfarejon kaj emisias diversajn numismatikaĵojn. La urbo post la jaro 1945 ŝanĝis la nomon, nun Zlaté Hory (t.t. Ora monto).

Agrablan tagon deziras Vlastimil

12.08.2026 15:37

*Saluton, kara Vlastimil,*

*multan dankon pro la kromaj nemalhaveblaj informoj pri la belega medalo! La priskribo kun artikolo por la freŝa revuo estas preskaŭ pretaj.*

*Mia edzino sugestis aldoni foton de vi okaze de la evento kiam la medalo oficiale estis enmanigita al vi. Eble tia foto ekzistas kaj do povus dekoracii la artikolon....ĉu?*

*Ĝis baldaŭa respondo!*

*Amike kaj numismate,  
Bert*

14.08.2026 17:23

Kara amiko,

dankon por via respondo.. Sugesto de via edzino estas bona, tamen, bedaŭrinde nenio fotagrafaĵo pri enmanigo de la medalo al mi ne ekzistas. Krome, mi sendos al vi la medalon, bonvolu sciigi al mi vian ĝustan adreson.

Agrablan tagon!

Vlastimil .

14.08.2026 17:23

*Kara amiko kaj kunnumismato,*

*Jen agrabla mesaĝo denove de vi!*

*En Vikipedio mi trovis abunde fotojn kaj informojn pri via riĉa kaj fruktedona vivo. Mi deziras, ke vi permesu al mi uzi iun el tiuj fotoj.*

*Antaŭdankon ankaŭ pro la baldaŭa sendo de via medalo, kiu ricevos belan lokon en unu el miaj vitroŝrankoj pri esperantaj numismatikaĵoj. Mi evidente repagos al vi por la medalo kaj la sendo per via bankokonto (?);prefere kaj sekurcele sendu ĝin registrite, ĉar mi ja repagos al vi.*

*Jen mia adreso: Bert BOON, Lijsterbeslaan 13, 9630 ZWALM, Belgio*

*Amike kaj numismate,  
Bert*

17.08.2026 9:55

Kara amiko,

mi ne rigardis, kio estas pri mi en Vikipedio. Tamen, vi povas uzi kian ajn informojn pri mi. Mi preparas forsendon de la medalo al vi.

Amike, Vlastimil

17.08.2026 10:19

*Denove koran dankon, Vlastimil!*

*Via Bert*

20.08.2026 9:53

Kara amiko,

almete mi sendas kontribuon por EN, mi pensas, ke pri tio ne estis en nia periodaĵo informo. Konfirmu, ke la teksto atingis vin.

Amike Vlastimil

20.08.2026 14:12

*Kara samideano!*

*Mi tre aprecias vian fidelan kunlaboron por helpi pliriĉigi la enhavon de nia revuo. Mi do ege ĝojas pro la nova artikolo pri, fakte, al mi nekonata, tamen tre interesa medalo. Evidente estus alloga por nia legantaro ankaŭ povi vidi foton de la koncerna medalo. Ĉu tio eventuale eblus, mi petas...*

*Mi jam kore dankas vin kaj antaŭdankas vin samtempe pro pliaj informoj.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

21.08.2026 9:57

Kara amiko, kompreneble mi emis sendi al vi la fotografaĵon de la priskribita medalo. Tamen, mi ne sukcesis forsendi ĝin pere de komputilo. Mi sendos ĝin al vi kaj vi povos poste skeni ĝin por EN. Agrablan finsemajnon.

Vlastimil

24.08.2026 15:46

*Evidente mi tutkore akceptas vian proponon skeni ĝin por EN...!*

*Amike,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

20.08.2026 21:04

Karaj Bert kaj Vivienne,

Reveninte de longdaŭra ferio per la ruldomo, mi kun ĝojo konstatis ke vi ambaŭ daŭre laboras por ENA kaj la revuo fariĝas ĉiam pli kaj pli ampleksa. Ni esperas ke tio estas signo ke via sanstato nuntempe pliboniĝis.

Dum nia vojaĝo ni hazarde vizitis pulbazon kaj tie mi vidis iun kiu vendis kelkajn medalojn. Mi tuj pensis pri vi kaj aĉetis kelkajn sed nun leginte la ENA – revuon, mi komencas dubi ĉu vi interesiĝos pri ili ĉar ili ne rilatas al Esperanto, sed mi donacos ilin tamen ĉar eble vi povos uzi ilin por interŝanĝi ilin kun aliaj interesitoj.

Do en venonta renkontiĝo kie ajn mi transdonos ilin.

Dezirante al vi ambaŭ eble plejan bonfarton,  
Amike,  
Katja kaj Hans

20.08.2026 21:04

*Karaj geamikoj,  
mi ege ĝojas, ke vi eĉ dum vojaĝo pensas al ni kaj al ENA.*

*Mi fakte fartas iom pli bone, sed liberan tempon ni apenaŭ havas provizore, ĉar ni preparadas kun niaj filoj baldaŭan jubilean feston (55 jarojn kune, Vivi kaj mi!) kun 17 gastoj en vilaĝa domo en la Ardenoj.*

*Do, ni certe denove vizitos vin, sed kiam precize...?*

*Kun amikaj salutoj,*

*Vivi kaj Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19 09 2026 15:09

Saluton, Bert,

Permesu, ke mi petas vian helpon. Mi serĉas numismatikajn revuojn. Ĉu vi eble ankoraŭ havas ekzemplerojn kun flavaj kovertoj, eldonitajn de nia Numismatica Tienen (1990-2005)? Aŭ kelkajn postajn numismatikajn "Novaĵleterojn" de la eks-prezidanto Pierre Degel?

Alia peto: ĉu vi povus havigi al mi liston de la landoj en kiuj ENA-membroj legas nian revuon?

Kun amikaj salutoj,

Peter (Budai)

22 09 2026 16:22

*Resaluton, Petro,*

*Bedaŭrinde mi ne plu havas la de vi petitajn revuojn kaj novaĵleterojn, escepte tiujn al kiuj mi kunlaboris. Kiel vi scias, mi loĝas jam kelkajn jarojn en Munkzwalm...*

*Eble vi prefere kontaktu mem la tinenan klubon, kiu probable ankoraŭ havas kelkajn revuojn.*

*Aldone mi kunsendas la liston kiun vi petis.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

22 09 2026 16:31

Saluton Bert,

Dankon pro via respondo. La listo de membroj kaj landoj estas vere impresa. Kia rezulto post tiom da jaroj de senĉesa laborado!

Saluton,

Petro

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.09.2026 20:42

*Kara amikino!*

*Esperante, ke vi fartas bone kaj havas iom da libertempo por helpi min, mi aldonas du medalojn, kiujn mi intencas priskribi en la venonta revuo de ENA.*

*Sur la unua troviĝas pola teksto, ne vere klara por mi, do mi petas vin reskribi ĝin per klara alfabeto. Krome mi bezonus ties esperantigon. La emblemo tute sube esta urba blazono de Varsovio, ĉu ne?*

*Pri la dua medalo mi havas jam kelkajn dimensiojn, sed mi ne scias kial Pisa kaj Varsovio tiam kunlaboris por eldoni centjariĝan memormedalon...*

*Tutkore mi anticipe dankas vin*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

20.09.2026 10:55

Kara Bert,

mi helpos vin kun plezuro.

Sur la una medalo:

1. Odo Bujwid 1857–1942

2. teksto en la pola: W 50 LECIE POLSKIEGO TOWARZYSTWA MIKROBIOLOGÓW.

WARSZAWA 1977.

JE LA 50-A DATREVENO DE LA POLA SOCIETO DE MIKROBIOLOGOJ. VARSOVIO 1977

<https://www.microbiology.pl/medale/>

Priskribo:

[pl: Na dolenajduje się symbol Warszawy – Syrenka, po lewej stronie kompozycja przypominająca struktury mikroskopowe (np. kolonie bakterii lub hodowle mikroorganizmów), nawiązująca do specyfiki naukowej.

Materiał: Brąz]

Laux AI: e-o: sube la simbolo de Varsovio – la Niksino, sur la maldekstra flanko, komponaĵo simila al mikroskopaj strukturoj (ekz. bakteriaj kolonioj aŭ mikroorganismaj kulturoj.) Materialo: bronzo

Pri la dua medalo bonvolu atendi iom da tempo. Mi havas multe da laboro kun la literatura konkurso "Esperanto ligas homojn", kiu ĵus finiĝas.

Amike

Maria Niemyjska

29 09 2026 11:22

Saluton!

Pri la dua medalo:

La UK-o 1987 okazis en Varsovio ankaŭ ĉi tie estis eldonita Unua libro.

Probable pro tio Regiono de Pisa eldonis ĉi tiun medalon.

Tion mi trovis.

Amike

Maria



# *ANONCOJ* & *EVENTOJ*

## **La plej granda arĝentaĵaro el la vikinga epoko trovita en Finnlando**



Antaŭ ne longe amatora arkeologo per metaldetektilo en Finnlando trovis unikan trezoron. Li elfosis ĝin kaj konstatis, ke tiu trezoro pezas pli ol 4,5 kilogramojn, konsistante el miloj da mezepokaj moneroj kaj arĝentaj juveloj, i.a. braceleto, metalgarnaĵo, arĝenta bido kaj pecoj de hakarĝento kaj rompita arĝento, kiuj dum la Mezepoko estis laŭpeze uzataj kiel pagiloj.

Fakarkeologoj taksis la trovaĵojn kreitajn en la jaroj 1000 ĝis 1500. La moneroj devenis el diversaj regionoj, kiel el la nuntempa Germanio, Anglio, Svedio kaj oni eĉ trovis arabajn dirhamojn.

La termino “vikinga epoko” ne supozigu, ke temas pri vikinga trezoro. Tiam la hodiaŭa Finnlando ja ne estis parto de la skandinava hejmregiono de la Vinkingoj.

Fakuloj ekde la eltrovo intense studas la diversajn artefaktojn.

Fonto: “Archeologie online”

## Varbilo por ENA!

**Karaj membroj!**

**Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

**Bert**

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol dek jaroj ĝis 172 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston! Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

[bert.boon@skynet.be](mailto:bert.boon@skynet.be)